WIKIPEDIA

Vota lingvo

Por samtitola artikolo vidu la paĝon Voto (apartigilo).

La **Vota lingvo** (nomita en esperanto foje ankaŭ kiel *voda lingvo* aŭ *vadja lingvo*) estas finn-ugra lingvo, hodiaŭ parolata de kelkdeko de votoj en tri vilaĝoj oriente de la enfluejo de rivero Luga al la Finna golfo, okcidente de Sankt-Peterburgo. La vota neniam havis fiksitan ortografion, kaj ĝia literaturo ĉefe estis parola. Tiuj kiuj ja skribis ĝin, ĉefe uzis cirilan alfabeton. En la vota la lingvo nomiĝas vaďďa tšeeli. La vota lingvo estas mortonta.

Laŭ popolnombrado en 1989 parolantoj de la vota estis ankoraŭ 62. Votoj ĉiam estis malgranda popolo kaj ekzemple en 19-a jarcento ilia nombro estis nur 5 000. Pli frue la vota estis parolata ankaŭ en Latvio apud urbo Bauska (t.n. krevenoj). En 2017 Vota havis nur 8 parolantojn sed 40-60 pliaj homoj sciis iom da vota. Ĝi estas parolata en tri vilaĝoj: Krakolo, Luuco kaj, Reko[1][2]

Vota lingvo	
vaďďa tšeeli	
Mapo pri la disvastiĝo de la lingvo	
Parolata en	Leningrada provinco, Rusio
Parolantoj	30–40 (1 998)
Skribo	latina alfabeto
Lingvistika klasifiko	
Urala	
Finn-ugra	
Finn-samea	
Baltmara finna	
Vota	
Oficiala statuso	
Oficiala lingvo en	neniu lando.
Lingva statuso	5 krize endanĝerigita
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-2	vot
ISO 639-3	vot
SIL	VOT
Glottolog	voti1245
Angla nomo	Votic
Franca nomo	vote

Eksteraj ligiloj

- Virtuala Votio - troviĝas anglalingvaj priskriboj de la Vota (http://web.archive.org/20090729213255/www.geocities.com/Vienna/3259/index.html)
- [1] (http://www.vadjamaa.narod.ru/language/language.html) (Pri la vota lingvo en la rusa)

1. ↑ [2] (https://en.wikipedia.org/wiki/Votic_language)
2. ↑ [3] (https://fi.wikipedia.org/wiki/Vatja)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Vota_lingvo&oldid=6975396"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 13:49, 8 jun. 2020.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.